



Ne preterlasu la okazon
travivi internacian
Esperanto-atmosferon!

PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Partoprenu la
Universalan
Esperanto-Kongreson
en Hamburgo!

Eidonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 22/1974 25 jun 1974
Aperas ĉiusemajne

UK-novaĵoj el Hamburgo

Nova honora protektanto

Post la novformado de la federacia registaro en Bonn la nova federacia ministro pri klerigado kaj scienco, Helmut Rohde, transprenis la honoran protektadon pri la 59a Universala Kongreso de Esperanto.

Kanceliero Schmidt en la honora komitato

Federacia kanceliero Helmut Schmidt deklaris sin preta fariĝi membro de la honora komitato por la UK. Samtempe li dediĉis al la delegitoj kaj gastoj de la kongreso salutmesaĝon, el kiu elstaras jena frazo: "Mi mem kiel politikisto konsideras grava tasko tion konvinki la homojn - ne nur en ĉi tiu lando - pri la neceso de komuna internacie valida lingvo."

Kongrespreparo dum futbal-matĉa paŭzo

Por la LKK Hamburgo nun kulminas laboroj altiri eminentulojn kaj diplomatojn al la kongresa inaŭguro de la 59-a UK. Ambasadoro Ralph Harry de Aŭstralio en Bonn, jam unufoje helpis, aranĝinte akcepton en sia rezidejo. Nun urĝis nova interparolo kun LKK, kaj ja li estis en Hamburgo okaze de la futballudo de la sialanda teamo kontraŭ la okcidentgermana, la 18-an de junio. Sed lia vizitprogramo ne lasis truon. Do, li invitis la prezidanton de LKK, d-ron Werner Bormann, kaj s-inon Bormann, kiu momente zorgas pri la honorgastoj, al la futbalejo kiel gastojn, sendinte al ili biletojn kaj aŭstralian flageton por eventuale svingi ĝin subtene al la aŭstralia teamo. Gesinjoroj Bormann, malekspertoj pri tiu sporto, povis solvi kelkajn problemojn dum la matĉa paŭzo en interparoloj kun la invitinta ambasadoro, sed ankaŭ kun diversaj el la ĝirige multnombra ĉeestintaj germanaj eminentuloj. Estas certe, ke por la Alta Protektanto, federacia ministro Helmut Rohde, alta oficisto venos saluti, kaj jam certigis la buŝan transdonon de salutoj de siaj registaroj al kulturministroj la Hamburgaj generalkonsuloj de Aŭstralio, Belgio, Hispanio, Israelo, Meksikio kaj Svisio. Pro la parte sukcespromesaj intertraktadoj LKK estas konvinkita, ke ankoraŭ pluraj aliaj oficialaj instancoj komisiis siajn konsulojn en Hamburgo partopreni la la inaŭguron kaj saluti.

Inaŭguro de la UK

La Solena Inaŭguro de la 59-a UK okazos dimanĉe, la 28-an de julio, je la 10-a horo, en la kongresejo Centrum Hamburg.

Taga karto

Por ĉiu, kiu ne povas aŭ ne volas ĉeesti la tutan kongreson, ekzistas la ebleco aĉeti tagan karton por 15 GM, kiu rajtigas partoprenon en la kongreso dum 1 tago.

Librostando

La UK-librostandon prizorgos Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg. Detalojn pri la kongresa programo Pilo-Press publikigos en la venonta numero!

Esperantoamike - Federacia Prezidento de Aŭstrio

Vieno (END) Nova prezidento de Aŭstrio fariĝis dum la dimanĉaj balotoj D-ro Rudolf Kirchschräger, ĝisnuna ministro pri eksterlandaj aferoj. La nova federacia prezidento, kiu fariĝis la posteulo de nia mortinta samideano D-ro Franz Jonas, antaŭnelonge membriĝis en la aŭstria "Societo por internacia kompreniĝo - Esperanto-amikoj". Ankaŭ la aŭstria federacia kanceliero D-ro Bruno Kreisky fariĝis membro de tiu aŭstria Esperanto-societo.

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

Andrzej Tomecki, la pola Esperanto-trubadoro, prezentis sian teatraĵon "Kaj tamen estas Varsovio" dum la 3-a Tutlanda Esperanto-Kongreso en Berlino (GDR) komence de junio. En ĵusa intervjuo kun Jerzy Grum en la Esperanto-Ekspreso lastdimanĉa li sciigis sian planon prepari novan spektaklon.

D-ro P. Neergard, konata dana sciencisto kaj esperantisto, ĉeestis internacian kongreson pri la aprezado de semajoj en Varsovio. Okaze de tiu restado en Varsovio li estis gasto de la Esperanto-redakcio de Pola Radio. En intervjuo li atentigis pri la malfacilaĵoj lingvaj dum ĉi tiu kongreso, pri la teknikaj mankoj ĉe la simultan-tradukado kaj la danĝero de lingvaj grupiĝoj pro manko de komuna lingvo. Krome la sciencisto atentigis pri la supereco de la anglolingvanoj el lingvaj vidpunktoj.

Hans Jürgen Feilke, Bremen, docento pri muziko ĉe la Bremena Konservatorio, restadis antaŭnelonge ĉe la muzika konkurso "Junularo muzikas" en Erlangen kaj Nürnberg, ĉe tiu okaza li ankaŭ vizitis Informcentron Esperanto Nürnberg.

Armin F. Doneis, ĉefdelegito por USONO de UEA, kaj lia edzino, faros 45-tagan viziton al Eŭropo. Ĉirkaŭ la 28-a de junio ili estos en Munkeno kaj la 14-an de julio en Stuttgart. Post la kongresa partopreno en Hamburgo ili vizitos Skandinavion.

Prof. D-ro Richard E. Wood, direktoro de la departemento de lingvoj kaj internaciaj studoj, Adelphi-Universitato Garden City, Usono, restadis en FRG. Post sia restado en Munkeno li gastis de la 20-a ĝis la 23-a de junio ĉe Reinhard Hauptenthal, Dudweiler. La 21-an de junio Prof. Wood prelegis pri la temo "La evoluo de la interlingvistiko en Usono" kadre de la Esperanto-kurso ĉe la universitato de Saarbrücken.

W. R. Aldridge, ĉeftraŭkisto de la ministerio por internaj aferoj de Novzelando, skribis al Eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, jenan leteron en Esperanto: "La oficistoj de la Traduka Fako de ĉi tiu ministrejo tre interesiĝas pri interlingvismo kaj pri la monda lingva problemo. Tial mi petas, ke vi bonvole sendu al ni la OKCIDENTGERMANAN REVUON. Nia poŝta adreso estas: Translation Service, Department of Internal Affairs, Private Bag, Wellington, Novzelando. Vin kaj la Okcidentgermanan Registaron mi dankas anticipe."

Radio Bervalio respondas:

Demando: Ĉu estas io komuna inter esperantistoj kaj futbalistoj?

Respondo: Principe jes! Ambaŭ grupoj batalas por la fina venko!

FUTBALA MONDCAMPIONADO 1974

FRG

Stato post la 1a Finalraŭndo

M Ĉ 74

Grupo 1

Poentoj

- | | |
|--------------|-------|
| 1. GDR | 5 : 1 |
| 2. FRG | 4 : 2 |
| 3. Ĉilio | 2 : 4 |
| 4. Aŭstralio | 1 : 5 |

Grupo 2

Poentoj

Grupo 3

Poentoj

Grupo 4

- | | | | | | |
|---------------|-----|---------------|-----|--------------|-----|
| 1. Jugoslavio | 4:2 | 1. Nederlando | 5:1 | 1. Pollando | 6:0 |
| 2. Brazilo | 4:2 | 2. Svedio | 4:2 | 2. Argentino | 3:3 |
| 3. Skotlando | 4:2 | 3. Bulgario | 2:4 | 3. Italio | 3:3 |
| 4. Zairo | 0:6 | 4. Urugvajo | 1:5 | 4. Haitio | 0:6 |

La unuaj decidoj estas faritaj kaj okazis selektado. Post la finiĝo de la 1a Finalraŭndo devas ekŝiĝi: Ĉilio, Aŭstralio, Skotlando, Zairo, Bulgario, Urugvajo, Italio, Haitio.

Ne estas surprizo, ke Zairo kaj Aŭstralio eliminiĝis, tion oni atendis, kvankam tiuj teamoj gajnis multe da simpatio fare de la rigardantoj. Kaj oni devas konstati, ke Aŭstralio ne permesis al siaj kontraŭuloj facilajn matĉojn. Sed ke unufanke Italio kaj Skotlando devas nun hejmenvojaĝi, kvankam nur pro pli malbona stato de la gola konto, kaj ke la du sudamerikaj teamoj, Urugvajo kaj Ĉilio, devas paki siajn kofrojn certe estas surprizo. Sed okazis du sensacioj dum la 1a finalraŭndo: La neatendita venko de GDR kontraŭ FRG kaj la konstanta, ne haltigebla marŝo sur la venka linio de la pola teamo kontraŭ Argentino, Haitio kaj Italio. Kvankam Jerzy Grum de Pola Radio en sia "Trarigardo de la sportaj eventoj" la estontajn ŝancojn de la pola teamo (Ĝi estas minaco por ĉiuj kaj kapablas tre multon!) taksas singarde, mi opinias tiu teamo estas serioza kandidato por la ĉampiona titolo.

La grupoj de la 2a Finalraŭndo

Grupo:A GDR, Argentino, Nederlando, Brazilo

Grupo:B Pollando, FRG, Jugoslavio, Svedio

Unu el la plej interesaj ludoj en tiu raŭndo certe estos la 3an de julio en Frankfurto inter Pollando kaj FRG.

Konversacio inter Tip kaj Tap

Tap: Saluton, kara mia Tipso!

Tip: Kion vi diras? Tipso...? Mi ne estas via Tipso, mi estas Tip!

Tap: Ne, vi estas Tipso, ekde nun! Aŭskultu! Vi ja scias, mi jam komencis lerni Esperanton laŭ la lernolibro "Esperanto por infanoj", estas kurioza, gajiga lernolibro pri musofamilio. Sed la musoj ne estas grizaj, ili estas verdaj...

Tip: Nun, ĉesigu tiun stultajon! Ĉu ni parolu pri musoj, aŭ pri futbalo?

Tap: Ne interrompu min, Tipso! Mi devas rakonti al vi...Unu el tiuj verdaj musoj flustris al mi jenajn vortojn: "Mi havas por vi belan Esperanto-nomon! Vi nomiĝas Tapso kaj via amiko nomiĝas Tipso! Tiele mi diras al vi nun Tipso kaj vi nomu min Tapso!

Tip: Nu, bone! Se vi insistas! Espereble mi ne pekas kontraŭ la verda Dio, se mi jam nun uzas Esperantan nomon ne jam sciante Esperanton! Mi ja aŭdis, ke regas severa disciplino en Esperantujo...!

Tapso kaj Tipso en Esperantujo

Tipso: Mi vere devas konfesi, ke mi eraris pri la esperantistoj. Ne ĉiuj estas futbal-muflistoj (malŝatantoj). Ekzemple mi legis en letero el la pola urbo Rzeszów: "Nune komenciĝas la malfermo de la MondaĈampionado pri Futbalo 74. La tuta Eŭropo furiozas, mi ankaŭ, kaj vi?". Tiele demandis min Walter Zelazny...

Tapso: Jes, futbalo furoras ankaŭ iomete en Esperantujo, speciale en la Esperanto-elsendoj de Pola Radio. Tiu futbala furorulo Jerzy Grum starigis jam kelkajn rekordojn felietonante pri la matĉoj de la pola teamo, li eĉ faris kromhoran laboron, nur por aktuale raportari pri la matĉo Pollando:Italio jam en dimanĉ-vespera Esperanto-programo...!

Tipso: Jes, mi admiras lin! Se mi ne jam estus piloido, mi volonte estus grumido.

Tapso: Kaj mi volonte estus ralfido! Vi ja scias, pri kiu mi parolas! Estas kompreneble, ke la aŭstralia ambasadoro, Ralph Harry, ĉeestis la matĉon de sia teamo kontraŭ FRG, la 18 jun en Hamburgo. Malpli nature estas, ke li invitis la LKK-prezidanton de Hamburgo, D-ro Werner Bormann, kaj lian edzinon Elsbeth al tiu ludo, sendinte al ili enirbiletojn kaj aŭstraliajn flagetojn. Ĉu la esperantista geedza paro svingis la flagetojn subtene al la aŭstralia teamo, ĝis nun mi ne povis konstati.

Tipso: Estas libereco de la konscienco, kiun teamon oni subtenas. Pli gravas al mi, ĉu oni parolis Esperanton?

Tapso: Jes, fakte, dum la matĉo inter Aŭstralio kaj FRG oni parolis Esperanton kaj oni eĉ diskutis pri kongresaj problemoj...!

Tipso: Kongreso, kongreso...! Bone, ke vi memorigas min! Ni devas diligente lerni, por ke ni povu konversacii kun la multaj kongresanoj en Hamburgo!

La semajno en la radio

Ofte Esperanto-elsendoj koincidis kun interesaj futbalmatĉoj. Do necesis decidiĝi: Ĉu futbalo aŭ Esperanto? Aŭ per la maldekstra orelo Esperanton kaj per la dekstra orelo futbalon. Tiele estis dimanĉe posttagmeze: Mi aŭskultis samtempe al Varsovio kaj al la futbalmatĉo en Stuttgart, sed kiam Deyna ŝotis la duan golon por Pollando, mi rezignis pri kulturo el Varsovio kaj dediĉis ambaŭ miajn orelojn al futbalo. Ĝetere, dum la tuta semajno iam kaj tiam oni povis aŭdi la Grum-ajn sportajn felietonojn aŭ futbalajn novaĵojn de la radia ĵurnalo. Per tio Pola Radio denove demonstris la aktualecon de la Esperanto-elsendoj. Grave al tiu aktualeco kontribuas nun la dua radia ĵurnalo dum la tria vespera programo. - Depost kelkaj semajnoj mi nun povas kapti la E - anguletojn kadre de la germana programo, je la 22a horo, sur la ondo 41 m. Lastdimanĉe Jerzy Grum citis tri leterojn de germanlingvaj aŭskultantoj, kiuj konfirmis la bonan aŭdeblecon de la vespera programo. La aŭskultantoj estas petataj sendi nun ankaŭ analizajn leterojn! Radio Varsovio anoncas novan konkurson, kiu daŭros ĝis la 30 okt 74. Konkursa teksto estas aldonita al tiu PP-eldono!

Vieno pli kaj pli fariĝas - malgraŭ la limigita elsendotempo - volonte aŭskaltata stacio kun ĉiam interesaj aktualaj komentarioj kaj kulturaj felietonoj. - Zagrebo ĉi-foje prezentis interesan E-programon kun eldiroj de lernantoj el E-eksperimentaj lernejoj. Romo nuntempe denove estas aŭdebla sur ondo 41 m. Berno daŭrigis la ege interesan prelegserion de d-ro A. Baur pri la svisa pentroarto. Ges-roj Gacond elsendis sian duan prelegon pri "Eŭropa Dokumentaro".